

ESPERANTO

★ TRIUMFONTA ★

Publikigilo de multaj gravaj esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolscienca).

Protektantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa
W.M. Page, advokato, Edinburgo
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gill Norton, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank-kaj fabrik-
direktoro, Kaunas.

N-o 197
22. 6. 1924

Redakcio:
Ĉefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redakciaj kunlaborantoj: H. Jung kaj M. Butin, L.K.

Administracio:
Horrem b. Köln, Germanlando

Abonprezo
po numero egalvaloro de 0,06 dolaro aŭ 0,20 sv. fl. por landoj, kies valuto aŭferis maksimume 50%; por ĉiuj aliaj landoj 0,06 dol. aŭ 0,25 sv. fl.

Anonprezo
po kvadrata-centimetro egalvaloro de 0,20 sv. fl. (ĉe antaŭa pago 0,15 sv. fl.), en „Internacia Komercio“ la duoblo.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgo, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

La Esperanto-movado en Italujo post la milito.

Torino, la urbo de la IX. Itala Kongreso. — Emanuel Reicher †.

La Esperanto-movado en Italujo post la milito.

Italaj ĝenerale, kaj la esperantistoj precipe, ne kutimas trotaksi sian sukcesojn kaj reklamigi ilin. Al tio aldonu la troofte nevenkeblan emon al sendependeco, aŭtonomeco plei plena, eĉ kiam nur la ŝananta dependeco estus kunlaboro kaj sumo de samcelaj klopodoj; kaj vi komprenas, kial tiel malofte kaj tiel nereklamigaj estas la sciigoj, kiujn la internacia gazetaro publikigas de tempo al tempo pri la okazintaĵoj de la esp. movado en Italujo.

Ĉi tial, precipe nun kiam la italaj samideanoj reasertas sian intencan prezenti inviton por la 1925-Universala Kongreso, estas oportuna ĝenerala rigardo al tio, kio estis la esp. movado itala de post la mondmilito.

Ĝi prezentas disvolviĝon malrapidan, negrandegan, sed (kio estas treege grava) konstantan kaj organisman. La movado revekiĝis post la milito — ĉi kaj tie en la plej gravaj urboj de Norditalujo. Jam de 1919 sentiĝis la emo al unuiĝo de la klopodoj, kiu havis siajn pionirojn en la revivigintoj de la Nacia Organizaĵo (Itala Esperantista Federacio) pere de l' samideanoj en Cremona kaj poste en Genova, de l' tiama prezidanto, la senlaca Pasiro Prof. Caroli, kaj sian unuan manifestacion en la kunveno en Verona en printempo de 1920. En la sama jaro fine la V-a Kongreso de Italaj Esperantistoj, okazinta en Bologna vidigis kuraĝigan plenan bildon de la stato de l' tuta movado per raporto, kiun mi mem havis la honoron kunmeti kaj prezenti, kaj komencigis laboron komunan kaj certigitan per la definitiva starigo de la Federacio kaj elekto de C.K. en Milano. Jam en la okazo de tiu kongreso la esperantistaro sukcesis vekti la atenton de aŭtoritatoj kaj de l' nacia eminentularo, precipe por la alivalora aiĝo kaj laboro de Komandanto A'essio, kiu reprezentis la Ministerion de Maraferoj kaj Instruado en Hago, en Bologna, kaj poste en Praha kaj en Genève.

La unua jaro de la organizita movado karakterizigis do per gajno de du gravegaj helpantoj: la Ministerio de Maraferoj kaj la komunumo de Milano, per disvastiĝo de libera Esp.-instruado kaj fondiĝo de multinombra gruparo. Bedaŭrinde erarkomprenoj kaj eraroj de la gvidantoj de FEL eble neeviteblaj pro la noveco de la laboro, malpermesis al FEL la plenan efikecon de sia kundordiga celo. FEL tamen ĝis tiam sukcesis kaŭzi atenton pri Esperanto en multaj lokoj kaj medioj, kie neniam serioze oni estis prikonsiderinta la aferon, eldonis gazeton kaj lernolibron en grandega nombro da ekzempleroj.

La sekvintan aŭtonon Nacia Kongreso okazis en Trento, kaj tie la samideanaro trezorigis la spertojn de la pasinta jaro, kaj donis la taskon reorganizi la Federacion per nova estraro, kies ĉefgvidanto estis Adv. Kaval Vaona en Verona kaj sek. Prof. Pizzi en Venezia. Samtempe oni decidis doni novan vivon kaj efektivan valoron al alia nacia organismo esperantista, t.e. la Itala Katedro de Esperanto celanta la registigon de la esp. instruistoj kaj unuforman reguligon de la esp. instruado en la tuta regno. Plie, la nacia organizaĵo rezignis al propra gazeto kaj oficialigis por si la jam ekzistantan revuon de eldonisto Paolet en S. Vito. La nova organizosistemo montrigis tre fruktodona, ĉar, dum ĉi loka grupo restis plene sendependa por la loka agado, la membronombro de FEL atingis 2000. Kursoj okazis en 350 lokoj (laŭ la raporto al LDN), la regnaj aŭtoritatoj pri instruado ktp. kaj turismo estis atentigitaj pri Esperanto kaj fine oni sukcesis havi oficialajn lerneksperimentojn en publikaj lernejoj:

t. e. en R. Marinistitoj (6), en Teknika Lernejo en Bologna, en Elementaj Komunumaj Lernejoj en Milano (2000 lernantoj!), Bologna kaj Cremona. Privataj iniciatoj kreskigis ĉiam la nombron de la lernolibroj, ĝis ĝi atingis la nombron cititan en samjara raporto de L. d N. de 18 gramatikoj kaj 5 vortaroj en sumo de almenaŭ 50000 ekzempleroj. La nacia revuo fariĝis, kia ĝi estas,



L. M. Grafo Teofilo Rossi, Stato ministro kaj senatano.

Prezidanto de la Komerca Ĉambro de Torino kaj de Unuiĝo de Italaj Komercal Ĉambroj.

unu el la plej elegantaj kaj interesaj en la tutmonda esp. gazetaro. Lab. grupo en Genova eldonas kaj dissendas tutmonden verkon de Mazzini en 10000 ekzempleroj. Por vigligi kaj faciligi la rilatojn inter la centra organizaĵo kaj la lokaj esp-istaroj oni kreis Delegitojn, kies laboro estis tre utila kaj ĉiam pli garantiis la necesan sendependecon de la lokaj agadoj kaj la kunligon kun la alialokaj kaj la komunecon de l' klopodoj ĉe la superaj naciaj kaj regnaj institucioj.

La sperto de jaro 1921 22 konvinkis la mirinde organizitan VII-an Kongreson en Trieste, koncentrigis ankoraŭ plie la gvidadon de FEL en tri solaj CK-anoj en unu sola urbo, kiu estis Verona. Al la celoj de FEL en la nova jaro oni aldonis tiujn estigis centron por disreklamado kaj disvendado de Esp.-lerno- kaj uzolibroj, kaj eldonis mem kolekton da propagandaj broŝuroj por la oficiala materialo, kiu intertempe amasiĝadis. Eliris do de tiam la bonega kolekto, kiun aliaj naciaj Esp.-organizaĵoj devas envii, de la „Quaderni della FEL.“: kies unua estis la traduko de l' Raporto de la Ligo de Nacioj, la dua la Oficiala Protokolo de l' Nacia Kongreso en Trieste, kaj poste la Protokolo de la Kongreso de Venezia, tiu de la Kongreso en Terni 1923, parolado pri la historia valoro de Esp. kaj, ĵus, scienca studo pri la sperto kun Esp. en publikaj lernejoj kaj la Konferenco de Genève.

Samtempe la Itala Katedro de Esperanto ricevis en Trieste sian definitivan statuton kaj regularon, kiu estigis ĝin tute preti esti rekonota de l' Registaro kiel serioza teknika organo turegna por la esp. instruado. Tiam la federalaj kotjoj estis tre altigitaj, kune tute la devon aboni nacian revuon, kaj tial la membronombro ege mal-kreskis. Tamen ĉe la fino de la oficiala jaro 1922-23 estis la federaciono pli ol 800. Okazis ankau, flanke de FEL, kiu estis la sola rekonita

reprezentanto kaj unuiĝo de la tuta nacia esperantistaro, la fondo de apartaj naciaj grupiĝoj por specialuloj, t. e. katolikoj kaj fervoistoj.

Konstante do daŭris la disvolviĝo de la esperantista movado, ĉiam gravigante laŭ kvalito kaj larĝo. Novaj urboj, novaj medioj, novaj eminentuloj eniris la movadon. Bedaŭrinde fariĝis baro por pua sukcesoj la netrankvila politika situacio de la lando; oni signis sukceson ĉe aŭtoritato, kaj baldaŭ la persono, kiu ĝin reprezentis, ŝanĝis. Kune kun la politika situacio, la ekonomia forportis de niaj rangoj multajn personojn priokupiĝintajn pro senlaborado aŭ malfacilecoj kaj haltigis la spertojn de instruado ĉe publikaj lernejoj, escepte de la Marinistitoj. Entute tamen tro larĝe jam estis diskonata kaj efikiginta la esp. movado, kaj la malfavoraj okazoj ne ma helpis ĝian pluan disvolviĝon, ĝis kiam la trankvilo de firma regado renovigis la eblon de fruktodona laboro. En printempo de 1923 la esp. movado itala povis registri la plej notindan inter siaj sukcesoj per la efektivigo de internacia kunveno en sia lando, kaj tia kunveno estis la Konferenco Venezia por Komuna Komercal kaj Turisma Lingvo, unu en la plej gravaj ŝtupoj por la suprenirado de la tutmonda esp. movado! La valoro de esperantigo (se oni povas uzi tian vorton) de Italujo estis tie donata per la patroneco de la koncerna R. Ministro, per la partopreno de multinombra kaj kompetenta reprezentantaro, kaj per la aliĝo de ĉirkaŭ 80 Komercal Ĉambroj kaj de 21 Foiroj. Aparte la laboro de la nacia organizaĵo plie estis: elekto de Nacia Konsilantaro por helpo al la CK, dissendo de komunikaĵoj al la nacia gazetaro, rilatoj kun la nova Ministraro, organizo de Interregionaj Kunvenoj, elekto de Komisararo por la utiligo de Esp. por la serĉo de Miliperdiitoj.

Nek haltis la laboro, nek haltis la disvolviĝo de la plano, kiu videbligis kiel unu tuto de 1919 ĝis la morgaŭo, en la efektiveco eble eĉ sen la konscio de la agantoj. Kiu laboras pri la detalo, ofte perdas la taigan senton pri la tuto, en kiu lia laboro mem havas lokon kaj funkcion. Nek malofte personaj apartiĝoj aŭ lokaj kaj momentaj erarkomprenoj kvankam bedaŭrindaj povas havi valoron en la rigardo de tia tutaĵo.

La VIII-a Kongreso en Terni konfirmas la gvidadon de FEL triafoje al Prezidanto Adv. Kaval. Vaona kaj ree al liaj kunlaborantoj. Cesstas la kunvenoj ree la Ministerial Representantoj de Instruado, Ekonomio, Maraferoj, Milito, Kolonioj, Publ. Laboroj, Poŝto. Lia Reĝa Moŝto kaj la Registrar-Prezidanto Mussolini respondas la saluton de l' kongreso.

La agado daŭras. Milano, ĉiam unua inter la unuaj, renovigas la eminentan ekzemplon de komunuma apogo kaj oficialigo al Esp.-kursoj. Ministerio por Ekonomio dissendas cirkuleron por la efektivigo de Esp.-kursoj en Komercal Lernejoj. Itala Katedro de Esp. daŭrigas sian teknikan seriozan, kvankam nebruan agadon. La aliaj urboj kaj grupoj sekvas. La librocentro de FEL laboras por la dissendado de esp. verkoj, la privataj iniciatoj provizas la lernolibron, ĉiam riĝante ĝin. FEL por spari elspezojn eldonas propran oficialan bu tenon apud la nacia revuo, kiu ĉiam daŭrigas sian apartan klopodon en sia bonega apero. Kursojn, grupojn, manifestaciojn oni ne povas listigi; ŝuficas diri: ili okazis ĉie. Sed fine unu ekzemplon, apud la oficiala sukcesoj en Milano, oni devas citi: Bari, kie samtempe okazas ok kursoj, el kiu nur du estas iniciato de esp. grupo, dum la aliaj okazas oficiale en Reĝaj aŭ aliadministracie Publikaj Lernejoj diversgradaj.

De Savona ĝis Fiume kaj Bari, de Bolzano ĝis Siracusa, la movado enradikiĝis kaj progresas

ĉiam al la pli firma unueco kaj seriozigo de la tuta afero, ĝis kiam la triumfo ne estos ategdata fakto, sed okazintaĵo.

Tamen, sen iluzio, sen troespero, la itala esperantistaro devos klopodi, per la atingita seriozeco kaj konkordo, atingi la plej supran ŝtupon de la propaganda momento, kiel eble plej baldaŭ: la aranĝon de Universala Kongreso.

Ni konvinkis nian kunnacianaron, ke Esperanto estas serioza afero. Ho, verigi tio, kaj vi venu are, gesamideanoj! Kune, ni donos al unu el la plej gravaj nacioj de Eŭropo la lastan necesilon por la plena konvinko, ke Esperanto estas ne nur serioza, sed impona, vivanta, perfekta. Kaj vi eble lernos, kiel en serioza senbrueco, oferdonante personajn emojn kaj necesojn unuj al la aliaj, ĉiam pretaj renovigi la oferdonon, la samideanoj de la cent urboj sukcesas en sia mirinda sunoromata patrolando starigi per siaj fondajoj fortikan monumenton, kiu eble estos por popoloj kaj gentoj lumturo almarŝota. *Umberto Toschi.*

Torino, la urbo de la IX-a Itala Kongreso.

La eksterlandano, kiu vizitas hodiaŭ tiun ĉarman landon, Italujo, kiu ĉiam estis nomata „ĝardeno de Eŭropo“, trovas tie ŝtaton forte unuigitan, kiu povas nuntempe kreadi lin, ke ĝi estas same kiel aliaj ŝtatoj, kie politika, kultura, arta vivo ĝenerale emas al unu centro, kaj disvolviĝas precipe de tie. Tamen tuj li ekvidas, ke politika unuigo tute ne forprenis al ĉiuj ĉefurboj de la antikkvaj malgrandaj ŝtatoj, el kiuj antaŭe Italujo kunmetiĝis, ilian karakteran individuecon. Torino, ne malpli ol la aliaj grandaj italaj urboj, konservas eĉ nun tiajn karakterojn, kiuj ĝin distingas de aliaj urbcentroj. La historio memorigas, ke al tiu ĉi urbo, eble pli antikva ol Romo, de kiu ĝi estis ĉirkaŭita, Cezaro Aŭgusto donis formon de kvadrangula tendeo por la legiaj militistoj, kiuj trovis en ĝi siajn vintrajn

kvartalojn. Ĝi tian formon grandigante konservis, kaj tio klarigas, pli ol kia ajn alia kaŭzo, la maloftan regulecon de ĝiaj belegaj stratoj, avenuoj, placoj, ĝardenoj, kaj eble klarigas ankaŭ la animon trankvilan, pripensantan kaj ŝajne iomete malvarman de ĝiaj anoj, la malplej sudal ne nur geografie, sed ankaŭ karaktere, de tuta Itallando.

Torino disvastiĝas sur ebena teritorio, ne multe malproksime de la antaŭajloj, kaj laŭlonge de ĝia suda flanko fluadas la rivero Po, kiu ĝin disigas de ĉarmega montetaro, semigita je belaj, ĝiaj dometoj kaj palacetoj. Kvar pontoj kunigas la bordojn de la rivero, kies helaj akvoj, sur kiuj speguligas unuflanke la montetaro, aliflanke la urbaj palacoj kaj la belega Valentina Parko, estas ĉiam sulkitaj de ĉiuspecaj barketoj, kio eksterordinare animigas la pejzaĝon.

La ĝenerala impresio, kiun ricevas la fremdulo, kiu ĝin vizitadas, estas ke Torino prezentas ŝajnon de serioza, laborema, nebruema, kvazaŭ



Ĝenerala vidaĵo de Torino kun rivero Po.

aristokrata urbo, kie instinkte oni evitas ĉiujn trograndiĝojn de la ekstera vivo. Dum multaj jarcentoj ĉefurbo de ŝtato saĝe regita kaj preskaŭ ĉiam sendependa, Torino havas tre noblan historion. Depost la komenciĝo kaj dum la disvolviĝo de tia politika movado, kiu alportis la italan unuigon, Torino estis la centro, kien rifuĝis ĉiuj italaj patriotoj. Fariĝinte ĉefurbo de nova itala ŝtato, ĝi tuj komprenis, ke ĝi devas cedi siajn rajtojn al Romo, ĉiama ĉefurbo de Italujo, kaj depost tiam ĝi dediĉis sin al la disvastiĝado kaj progresado kiel industriema kaj komercema urbo konkurante kun la urba fratino Milano.

Tre multaj kaj gravaj estas la vidaĵoj, kiuj ege povas interesi la fremdulon en Torino.

Ni memoras nun kaj plibone priskribos en sekvonta artikolo, se ET donos al ni la eblecon tion fari, la Palacon „Madama“, kiu staras en la Kastelplaco, interesege antikva kontraŭaĵo, en kiu oni ekvidas la postsignojn de la roma civilizacio. Oni admiras la belecon de la mezepoka kaj de la moderna arkitekturoj; la Palacon Reĝan, ĉe kiu estas precipe vizitinda la Reĝa Armilaro, enhavanta tre interesajn artojn da armiloj mezepokaj; la Universitaton, antikvan Studejon, unu el la plej konataj en la eŭropa studomondo; la vastan placon „Vittorio Veneto“, la plej grandan en la tuta mondo, de kiu ne malproksime staras la stranga konstruaĵo, kiun oni ekvidas en nia bildo, la „Mole Antonelliana“, la plej alta murkonstruaĵo en Eŭropo (165 metroj).

Aliaj mirindaj torinaj konstruaĵoj estas la ĉefstacidomo; la Katedralo, dediĉita al S-ta Johano, monumento kiu datumas de la fino de la XV-a jarcento, kie oni respektigas la tre sanktan „Sindone“, t. e. la litotukon, kiu envolvis la korpon de Jesuo; la kastelo de l. Valentino en

la ĉarma samnoma parko; la Mezepoka Kastelo, konstruita dum la jaro 1884, kiu imitas tute perfekte la belegajn famajn kastelojn de la Aosta Valo. Sur la plej alta pinto de la proksima montetaro staras la fama baziliko „Superga“, konstruita de Viktorio Amadeo II dum la komenciĝo de la XVIII-a jarcento kaj depost tiam tombejo de la reĝaj princoj, tiel kiel la Roma Panteono estas tombejo de la italaj reĝoj, depost kiam la antikva mondĉefurbo estas samtempe ĉefurbo de Itala Ŝtato.

Preskaŭ sur ĉiu placo staras monumento. Krom la Valentina Parko enhavas Torino multenombrajn ĝardenojn, kiuj donas al ĝi diversan kaj ĉarman aspekton.

Torinon neniam povos forgesi la eksterlandanoj, kiuj ĝin vizitos okaze de la venonta Nacia Esperanta Kongreso. Ĉe ĝiaj samideanoj ili trovos fratajn akceptojn, ĉar piemontaj esperantistoj estas nun multenombraj. Nia movado ĉiam plie disvastiĝas en tiu ĉi regiono, kiu estas el la plej progresema de Italujo, kaj al ĝi interesiĝas eĉ la estraroj. Lia fame konata Grafo Moŝto Teofilo Rossi, ŝtatministro kaj prezidanto de la Unuigo de Komercaj Cambroj, depost multe da tempo kora subtenanto de nia ideo, bonvolis akcepti prezidantecon de la Honora Kongresa Komitato, al kiu partoprenas inter aliaj Lia Moŝto Komandoro U. Renda kaj multaj altestimataj personoj, kiel senatoroj, deputitoj, profesoroj, altaj ŝtatofunkciistoj ktp. Ĉio ĉi certigas bonegan sukceson al la grava kunveno de la italaj kaj fremdaj samideanoj en la mirinda ĉefurbo de Piemonto.

D-o Josefo Giani.

Programo

de la IX. Itala Kongreso en Torino.

- Sub la honora protektado de plej eminenta reprezentantoj de itala publiko.
- Sabato 2. 8. Laboroj de la Itala Katedralo de Esperantistoj ktp.
- Vespere: konatiĝa vespero.
- Dimanĉo 3. 8. matene Solena malfermo, 16 h. Parolado de Prof. Meazzini, 20 h. Muzikvespero en Teatro.
- Lundo 4. 8. matene Raporto de C.K. de FEL, posttagmeze: Fakaj kunsidoj, voĉdonado, elektoj, fermo Vespere Oratora konkurso.
- Mardo 5. 8. Ekskurso al Superga por kongresanoj neveturontaj al antaŭkongreso en Verona kaj al Wien.

XV. Brita Esp.-Kongreso en Chester.

156 samideanoj ĉeestantaj enregistris siajn nomojn kiel partoprenantoj.

La malferma kunveno okazis sabaton la 7 junio kaj estis prezidata de Prof. W. E. Collinson el la Liverpoola Universitato. Per bela flua esperanta parolado la profesoro esprimis sian ĝojon je la oportuno donita al li prezidi la Britan Kongreson. Li memorigis la ĉeestantaron pri la fakto, ke antaŭ centoj da jaroj en tiu ĉi sama urbo troviĝis la romaj legioj, kiuj ne povis kompreni unu la alian kaj estis devigitaj uzi lingvon latinan, la tiaman helplingvon, por sin interkompreni.

La urbestro s-o konsilanto Charles P. Cockrill bonvenigis oficiale la kongresanojn. Komencante sian parolon en Esperanto li esprimis sian

tutkoran simpatian al nia movado kaj finante angle li deziris al la Kongreso sukceson: kaj promesis influji la edukadan komitaton por enkonduki Esperanton en la urbajn lernejojn.

Poste parolis diversaj oratoroj pri la rolo de Esperanto en komercio, paco, muziko kaj radio-felafonio.

La ĉiujara kunveno de la Brita Asocio okazis sabatojn vespere. Ĉi tiu kunveno distingigis de ĉiuj aliaj antaŭaj kunvenoj pro la fakto, ke pli ol iam la anoj vigle diskutis pri la internacia organizado de nia movado.

Oni aprobis per baloto proponon de la konsilantaro, ke la brita esperantistaro akceptas principe la decidon de la C. K. en Genève pri ŝango de la kontrakti de Helsinki rilate al la organizo de la Universalaj Kongresoj. S-o Warden, prezidanto de K. K. K., kiu ĉeestis, vigle disputis la rajton de la C. K. fari tiun ŝangon, ne konsultante la superan aŭtoritaton, kiu estas la Universalaj Kongresoj.

S-o W. atentigis, ke la nuna K. K. K. funkcias ĝis nun sub la Universalaj Kongresoj, al kiu ĝi estas respondeca, do neniu alia komitato havas la rajton ĝin nuligi.

Alian decidon alprenis la Kongreso rilate al UEA. Tio estis ankaŭ rezulto de la kunveno de Genève. Oni decidis principe helpi la havigon de anoj por UEA per kreo de dupecaj aneoj. Unu, kiu nur aniĝas al BEA, kaj alia, kiu aniĝas al ambaŭ organizoj kune UEA kaj BEA. Kondiĉo tamen estis aldonata al la rezolucio „ke la redaktoro de Esperanto“ definitive akceptos la finan decidon de la lingva akademio pri la fino de landnomoj, kiam ili estos denove prikonsiderataj.

S-o J. M. Warden estis unuanime elektata honora prezidanto de la Brita Asocio, la unua honora prezidanto de la Asocio post la morto de D-o Zamenhof.

Tiu honoro, laŭ konstato de la ĉeestantoj, meritis s-o Warden tuteple pro la granda servo al nia movado ĝenerale kaj al la brita nacia movado aparte. S-o John Merchant estis reelektita al la prezidanta seĝo, kaj kun malmultaj ŝanĝoj ĉiuj aliaj ofiĉistoj estis elektataj.

Dimanĉon la 8 junio okazis la kutima esperanta di-servo, ĉe kiu predikis s-o Luyken, la aŭtoro de la originalaj esperantaj romanoj.

La bela sumo de £ 7 (sep funtoj) estis kolektata ĉe la di-servo por la „Ligilo“. —

La komuna tagmanĝo, kiun partoprenis 139 personoj, estis agrebla familia festeno, ĉe kiu oni toasitis la anojn de diversaj organizoj kaj de la organiza komitato.

Post rekalkulado kaj enregistvo de ĉiuj anoj de la kongreso evidentiĝas, ke la nombro de la ĉeestantoj proksimiĝis al 200.

La labora parto de la kongreso finiĝis per mia lasta raporto dimanĉon posttagmeze, kiam oni komune tagmanĝis kaj toasitis ĉe la tablo la komitatanojn, la Lancashire & Cheshire Federation, en kies regiono okazis la kongreso, kaj la Britan Asocion de Esperantistoj. Depost tiu tempo nur unu malgranda, kvankam sufiĉe grava laboro estis farata. Inter la 7—8 horo dimanĉon vespere okazis subĉiela propaganda kunveno ĉe la bordo de la rivero Dee. Ses oratoroj partoprenis kaj multe da propagandaj folietoj estis disdonataj.

Vespere estis organizata promenado laŭbordo de la rivero al Eccleston Ferry, pitoreska loko apud Chester, dum aro da kongresanoj sin amuzis en la halo per improviziita koncerto.

Lundo estis la tago, kiam la ĉefaj amuzoj komenciĝis. La tuta kongresanaro ekskursis al la bela valo de Llangollen en Kimrujo. Samnokte okazis la ĉiujara festbalo.

Mardo estis alia ĉekursita tago. Per aro da aŭtomobiloj oni veturis al Hawarden Castel, konata hejmo de la fama ŝtatisto Gladstone, kaj samvespere la bela kongreso finiĝis per adiaŭa familia rondo kaj koncerto.

La XV. Brita Kongreso de 1924 estis aparte notinda de ĉiuj antaŭaj kongresoj per tri faktaj:

1. Oni diskutis dum la kongreso pli ol iam pri la internacia organizo de nia movado.
2. Neniu, eĉ la plej maljunaj fraŭlinoj, grumbliis pri la aranĝoj de la organizantoj.
3. Okazis neniu deficitto en la organizaj elspezoj. La antaŭaj du kongresoj faris deficiton po £ 100.

La XVI. Brita Kongreso de Esp. 1925 okazos en Leamington. La mezlanda Federacio de Esp. faris la inviton dum la nuna kongreso, kaj la kongreso akceptis unuanime la inviton.

J. D. A., Liverpool.

Jarkunveno de „Centra Dana Esperantista Ligo“.

Dum la Pentekosto-tagaj, 8—9 junio, okazis en Aarhus la ordinara ĝenerala kunveno kune kun la jarkunveno de Centra Dana Esperantista Ligo. (La Ligo konsistas el la diversaj danaj Esperanto-societoj.)

Ĉeestis esperantistoj el Kjöbenhavn, Odense, Grenaa, Vejen, Horsens kaj Aarhus; sed bedaŭrinde neniu eksterlandano.

La jarkunveno estis tre sukcesa laborokunveno kun bone vizititaj ekskursoj al la ĉarma ĉirkaŭaĵo.

La estraro de C. D. E. L. konsistis nun el s-o Martin Blicher, Kjöbenhavn, prez.; s-o Georg Hinrichsen, Kjöbenhavn, viceprez.; f-lino Anna Petersen, sek.; f-lino Johanne Jensen, kas.; s-o C. A. Hoorslev, Aarhus, s-o A. Andersen, Odense, f-lino Agnes Melchior, Refnsaa.

La Germana Kongreso en Plauen. (Pentekosto 1924.)

Estas jaŭdo. Post la tagmanĝo. Oportune sidante en la gastejo „Braunes Ross“ (Bruna Cevalo) en Auerbach en Vogtlando antaŭ ĝlaso da bona plisena biero kaj fumante aroman cigaredon de Jasmaŝi, mi rigardas tra la fenestro eksteren, kie sur la foirejo sub ĝruo da alikreskaj filioj plaŭdas la urba puto. Jen taga medio por rememorigi al mi la jus pasintajn belajn tagojn.

El malproksima angulo de la regno mi alvenis — el okupita Rejnlando — por travivi kun samnacionoj harmonian kunestadon dum esperantista kongreso.

Mi volas anticipi: la regiono, la urbo, la homoj, la vetero — ĉio kuniĝis por fari la kongreson tre agrable rememoraĵo.

Aveno.

Sabaton mi alvenis. En la stacidomo mi trovis la Akceptielon. Kompleza knabo gvidis min al la hotelo. En la stratoj sur diversaj domoj fliris la verda flago kun la kvinpinta stelo — samideana saluto, kiu agrebla tuŝis la koron.

Vespere estis en „Zentra halle“ (Centra Halo) senĝena interkonata ĝa kunveno, pibeligita per bonhumora teatraĵo „O armer Oskar“ (Ho bedaŭrinda Oskaro!), ludata de la Esperanto-Grupo de Falkenstein, kaj per prezentaĵo en vogtlandaj kostumoj kaj dialekto „In der Huŝnstube“. S-o Rödel salutis la kongresanojn nome de la Loka Komitato. S-o Sandrock el Esesen dankis nome de la gastoj pro la bona akcepto.

Malferma kunvido.

Lasolena malferma kunvido komencis dimanĉon je 10.30 h per preskaŭ tuthora saluta kaj propaĝanda parolado de la prezidanto de GEA, D-o Steche, kiu sin turnis precipe al la industriaj kaj komercaj rondoj de Plauen.

S-o supera urbestro Lehmann salutis la kongreson kiel ties honora prezidanto kaj kiel reprezentanto de la urbo Plauen kaj prezentis „koran, gajan, sunan pentekostan bonvenigon“.

S-o polica direktoro D-o Thoring surprizis la kongreson per salutarparolo en Esperanto. Poste parolis la reprezentantoj de UEA (s-o Rockmann), de Danzig (Fox), de la Nordalinga Ligo (D-o Möbusz), de Revelo (Junker), de la Silezia Ligo (Habelok), de Berlin kaj Potsdam (dir. Glück), de la sudgermanaj esperantistoj (Hönigsberger), de Sudokcidenta Ligo (Schönrich), de Chemniz (Feder) kaj kiel eksterlandano s-o vickonsulo v. Frenckell el Dresden. Por la junulara grupo Leipzig parolis marmorulisto kaj por la Esperanto-Instituto de la Germ. Respubliko Prof. D-o Dietterle. Ĉeestis ankaŭ reprezentantoj de la plauen gazetararo.

Per kanto de „La Espero“ finiĝis la malferma kunvido.

Unua laborokunvido.

Dimanĉon ptgm. je 3.15 h. D-o Steche malfermis la unuan laborokunvidon.

Salutas reprezentantino de la Esperanta Ligo de Germ. Blinduloj.

S-o Rödel memorigas, ke pasis dek jaroj, de kiam Prof. Dietterle akceptis la gvidadon de la Esperanto-Instituto, kaj transdonas al li florbukedon.

Kunvido akceptas proponon, laŭ kiu anoj de aliaj mondlingvaj sistemoj ne rajtas partopreni la laborokunvidojn.

D-o Steche legas la jarraporton de GEA kaj esprimas bedaŭron, ke la situacio de la asocio malboniĝis pro diversaj malfavoraj cirkonstancoj.

D-o Arnold legas la kasraporton, laŭ kiu la enkasoj je 31 marto 1924 estis 578,71 or-mk., krom kelkaj eksterlandaj monbiletoj kaj aliaj valorpapiroj.

Ambaŭ raportoj estas akceptitaj post debato. Oni opinias, ke la malboniĝinta situacio de GEA ne estas kaŭzo por pesimismo.

Vigla diskuto farigas ankaŭ pri la politika tendenco de GEA. La kunveno decidas, ke la asocio restu poliitike neŭtrala.

Kunveno komencas s-on Junker, la novan prezidanton de la asocio konsilantaro, prepari reorganizon de la asocio.

Poste oni legas saluilegramojn kaj leterojn. Salutas persone reprezentantoj de llepto kaj de germanaj instruistoj.

Por la novelekto de la estraro la konsilantaro proponas: prez. D-o Steche, viceprez. D-oj Vogt kaj Arnhold, sekr. Hönigsberger, kas. Dilhofer; per elekto de la du lastaj sinjoroj la side de la asocio venus al Nürnberg. Okazas vigla, parte iom persone-akra debato; fine la punkto estas prokrastata ĝis la morgaŭa tago.

Propono pri ŝango en la statutoj, ke la estraro konsistu el „minimume tri personoj“, estas akceptata.

Dua laborokunvido.

En la dua laborokunvido, malfermita lundo je 2.30 h., la estraro estas elektata laŭ la propono de la antaŭa tago.

Propono de la grupo Breslau, ke la ligo enkasigu la kotizon por GEA, estas transdonata por prilaboro al s-o Junker.

Dua propono de la sama grupo, ke GEA dungu „migrantan“ propaganda-paroladiston“, estas modifata tiusence, ke GEA petu la grupon sciigi al ĝi taŭgajn paroladistojn en sia regiono.

Koncerne la imposton de 500 mk. por vojaĝantoj eksterlanden, kiu minacas la kongresanojn de la XVI-a, Prof. Dietterle sciigas, ke esperable la imposto estos nuligata aŭ almenaŭ modifigata por la vizitantoj de la XVI-a. La Esperanto-Instituto ankoraŭ informos pri tio.

Propono de la grupo Plauen, ke oni decidu devigan abonon al „Germana Esperantisto“ por ĉiuj membroj de GEA, escepte samfamilianoj, estas akceptiata.

Prof. Dietterle raportas pri la agado de la Esperanto-Instituto kaj petas, ke oni pli serioze ol ĝis nun kunlaboru ĉe la statistiko, kiuj estas plej efika bazo por sukceso ĉe oficialaj rondoj. Li petas, ke oni laŭeble subtenu la Instituton.

La kunvido dankas lin per aklamado kaj levigo.

Propono de la gazetara komitato, ke ĉiu grupo anoncu ĝis 15 julio personon, kiu prilaboros la lokan gazetaron, estas akceptiata.

S-o Blankenheim informas pri projekita karavano de Berlin al Vieno.

Poste okazas debato pri la sintenado de GEA al la esp. laboristoj. La kunvido denove akcentas la neŭtralecon de GEA.

Finna punkto: loko de la venonta kongreso. — La unuan fojon neniu urbo inviis. Propono elekti Potsdam estas rifuzata de la potsdamanoj. Propono pri Magdeburg estas rifuzata de s-o Rockmann; sed post parolado de f-lino Küster el Magdeburg, kiu opinias, ke estas eble aranĝi la venontan kongreson en Magdeburg, la kunvido esprimas la deziron, ke la venonta kongreso okazu en Magdeburg, se la tieaj gesamideanoj konsentos.

Propono Junker, aranĝi la kongresojn je alia dato ol pentekoste, estas malakceptata.

Propono Reber, nomi la venontan kongreson la XIV-an, ĉar la lastjara kongreso ne povis okazi, estas akceptata.

Je 6.50 h. la prezidanto fermas la kongreson, dankante la Lokan Komitaton kaj la ĉeestantojn.

Diversaj aranĝoj.

Dimanĉon okazis „Vespero en Esperantujo“, lerte gvidata de s-o Minor kiel konferenciero. La tuta programo estis nur esperantlingva. Kantis f-linoj Lotti Keilig el Auerbach kaj H. Nickel el Potsdam, deklamis s-o Degen el Leipzig kaj f-lino Zschepek el Dresden. Ankaŭ s-o Ellersiek kaj mi, laŭ invito de la Loka Komitato, aperis sur la sceno.

La balo, okazinta lundo vespere, estis ne tre multnombro vizitata. Malbone pro la kongresa kaso, sed des pli agrable pro la dancaj partoprenantoj.

Dum la kongresaj tagoj la kongresanoj kaj la publiko povis senpage viziti Esperanto-Ekspozicion, laŭcele aranĝitan de la Esperanto-Lernejo Plauen en salono de restoracio „Tunnel“.

Lundo kaj mardon matene parto de la kongresanoj faris ekskursojn al Vogtlanda Svisujo.

Mardon tagmeze la pli granda parto de la kongresanoj kolektiĝis ĉe la supra stacidomo por veturo al Bad Elster, konata banloko, kie la prezidanto de GEA s-o D-o Steche faris paroladon. Vespere estis, honore al la esp. gastoj, grand oza iluminado „venecia nokto“ kaj fajroludoj apud la lago.

Fakkunvidoj okazis flanke de UEA, de esp. instruistoj, sciencistoj, poŝtoficietoj kaj junularo.

Resumo.

Kiel mi jam anticipis: la regiono, la urbo, la homoj, la vetero — ĉio kuniĝis por fari la kongreson tre agrable rememoraĵo.

La regiono — ĉarma, ĝojiga, kiel ni kantis dum la dimanĉa vespero:

Ni estas en Vogtlando nun
Kun la pejzaĝoj be laj
Kaj ĝojo br las kiel sun
Sur la vizagoj hejai.

La urbo, ĉefloko de Vogtlando kun ĉ. 115 000 loĝantoj, estas alloga; tre interesa en sia malnova parto; grandurba en siaj novaj kvartaloj; belaj rektaj stratoj pro la monfeta fereno jen supren, jen malsupreniĝantaj, modernaj loĝdomoj, grandaj fabrikoj. Plauen estas mond fama pro sia punto-kaj brodaĵo-industrio.

La homoĝoj — afablaj; la fraŭlinoj — kajaj, kaj preskaŭ ĉiuj bonguste vestitaj. Kaj la vetero? Pli bonan kongresveteron oni eĉ ne povus deziri. Ne tro varme, ne malvarme; foje eksplodis pluveto, kiu eĉ pli agrabligis la temperaturon.

Aldonu la bonajn kongrespreparojn, kaj vi komprenos, ke la kongresanoj ĝenerale havis tre kontentigan impreson pri la XII-a Germana Esperanto Kongreso kaj certe ĉiam volonte rememorigos al si la belajn tagojn travivintajn en Plauen.

Post la kongreso.

En la hotelo en Plauen — „Fürstenhalle“ (Princa Halo), mi povas rekomendi ĝin al ĉiu samideano — neatendite mi trovis malgrandan aron da kunkongresanoj el diversaj partoj de la regno. Ni estis vera familia rondoj: ĝes-oj rektoro Helmholz el Potsdam, s-o Gerisch el Auerbach kun siaj ĉarmaj „kongresfilinoj“ f-linoj Lehmann kaj Kellig, kies belan voĉon ni jam povis ĝui dum la Universala Kongreso en Nürnberg kaj nun denove en Plauen, plue s-o Feder el Chemnitz kaj s-o Hirschberg el Hildburghausen. Matene antaŭ la kunsidoj kaj vespere post la kongresa laboro ni kunigis en hotela saloneto kaj agrable pasigis la horojn per kantado kaj rakontado. Nur nevolonte ni forlasis nian hotelon kaj la afablan mastrumistinojn, kantante: „Schade! Wär'n doch so gerne hier geblieben!“ (Domaĝe! Volonte ni estus restintaj ĉi tie!).

Parto de nia rondoj restis kune ankaŭ en Bad Elster.

Fine s-o Gerisch kaj liaj „kongresfilinoj“ rekomendis al mi akompani ilin al Auerbach por unu aŭ kelkaj tagoj. Nu, kiu povas kontraŭstari al tia afableco kaj precipe al la invitantaĵoj de du belaj fraŭlinoj?

Kvankam mia intenco estis, post la kongreso viziti la Harz-montaron, mi plezure konsentis, kunveturis — kaj jen mi troviĝas en Auerbach kaj finskribas mian raporton.

Morgaŭ mi devas ree forlasi vin, ĉarma Vogtlando, por reveturi al mia malproksima Rejnlando; sed mi konservos al vi, viaj urboj, viaj loĝantoj kaj viaj filinoj ĉiam honoran lokon en mia koro.

Espereble la kongreso de Plauen donis al la germana esperantistaro novan kurajoĝon kaj novajn fortojn por fervora agado. Niaj ŝancoj estas promesplenaĵoj. Ni utiliĝu ilin kaj laboru!

Teo Jung.

La jubilea kunveno de la Hungara Esperantista Societo Laborista.

La 4 majo okazis la 10-jara jubilea ĝenerala jarkunveno de la H.E.S.L. Ĉeestis la kunvenon krom 180 membroj la delegitoj de ĉiuj fakorganizacioj kaj la soc. dem. partio, kiuj en sia salutarolado promesis ankaŭ pluan plenan helpon kaj subtenon por la esperantista laborista movado hungarlanda. Post la malfermo per la prezidanto la sekretario raportis pri la disvolviĝo de la societo. Ĉar dum la milito la societo ne funkciis, ĝian ekfunkcion oni povas kalkuli nur de 1920, kiam ĝi havis 50 membrojn. Nun ĝi jam havas 715 membrojn aktivajn kaj 12 grupojn en diversaj landpartoj. La societo aranĝis de 30 10. 1923 ĝis 30 4. 1924 33 kursojn por komencantoj, entute ĉirkaŭ kun 1600 partoprenintoj, 11 propagand-vesperojn kaj aperis ĉi artikolojn pri Esperanto en multe da laboristaj gazetoj. Fondiĝis instrua, prop. g. g. a. d. amuza kaj eidona fakoj. Ĉi lasta sendas al ĉiuj grupoj ĉiusepacajn esperantaĵojn. Krom ĉi tiuj fakoj ankaŭ la ĥoro de la societo bele funkcias. Post la raportoj de la kassisto kaj kontrolantoj sekvis la elekto de la nova gvidanaro kaj fotografado de la ĉeestantoj. La kunveno fermis amuziga prezentado kun danco. Pri la kunveno raportis multaj laboristaj revuoj, gazetoj kaj journaloj.

Bleier, Vilmos.

IV. Rumana Esperanto-Kongreso.

2—4 aŭgusto 1924.

La nunjara IV-a landa kongreso de la rumana esperantistoj okazos la 2—4 aŭgusto en la urbo Arad, grava centro kultura kaj ekonomia. Post la kongreso okazos karavana vojaĝo al la Deksesa en Wien, tra Budapeŝt. Eksterlandaj gastoj estas kore invitataj. Informojn donas la D.L. de UEA s-o St. Ferenczy, Arad, str. Mocioni 21.

E. C. R.

Emanuel Reicher †.

Denove unu el la plej meritplenaj samideanoj, kiu jam estis en persona interrilato kun nia neforgebla majstro D-o Zamenhof, forlasis nin por ĉiam:

Emanuel Reicher,

la fama aktoro, kiu per sia arto helpis al la plena sukceso de la grandioza „Ifigenio-prezentado“ en la VIII-a internacia kongreso de Esperanto en Dresden 1908.

La 19 majo 1924 okazigis en la krematorio Berlin-Wilmersdorf la cindriĝo de tiu ĉi ĝenulo. La signifon de Emanuel Reicher por la teatra arto pravas la multnombra ĉeestantaro de plej eminentaj geaktoroj kaj intelektaj personoj dum la cindriĝa soleno.

La grandaj meritoj de la alisitata mortinto plej bone estas dokumentitaj per la diversaj nekrologoj ĉe lia katafaloko.

Pastro Diesteĉ, persona amiko de Reicher, priskribis per kortuŝantaj vortoj liajn altvalorajn etikajn ecojn.

La prezidanto de la Asocio de la germana aktoraro, s-o Rieckelt, kaj la intendanto de la ŝtata teatro s-o Jessner, karakterizis Emanuel Reicher kiel eminentan kaj meritelan aktoron kaj kreinton de moderna teatra arto.

La mond fama aktorino s-ino Irene Triesch aldonis ankoraŭ pli detalan karakterizon kaj en elokventa maniero pentris Reicher kiel homon ĉiam pretan, helpi al la suferanta kolegario.

La prezidanto de la Berlina Esperanto-Gruparo s-o Direktoro Gluck parolodis impresan nekrologon en la nomo de la tutmonda esperantistaro, dankinte al Reicher pro lia kunlaborado en Esperanturo.

Bedaŭrinde ni ne povas represii la tekston pro manko de loko.

La Esperanto-Gruparo Berlin intencas aranĝi en aŭtuno

solenan momor-feston por honorigo de Emanuel Reicher

en k' u aktive partoprenos unu el la plej eminentaj germanaj aktorinoj Irene Triesch kaj ankoraŭ aliaj famuloj el la teatra mondo.

La detalan programon ni pli poste publikigos. Direktoro J. Gluck, prezidanto de Gruparo Berlin.

Pri organizado.

Kvankam ne plu junaj, ni tamen ankoraŭ ne trovis, kiamaniere ni devas organizi nian movadon. Jam de 37 jaroj ekzistas Esperanto, kaj ĉiutage oni proponas novan manieron de propagando kaj de organizado. Ĉiu scias, aŭ opinias scii, la veran solvon de la problemoj, kaj ĉiutage ni kreas novajn aliĝantojn al nia movado kaj ĉiutage ni perdas aliajn. Felice la novaĵ estas plurmultenombraj al la malnovaĵ, kaj ni tamen progresas, sed tro malrapide.

Dum la pasintaj universalaj kongresoj la ĉefa afero estis la organizado de la esperantistoj. Post longaj, ofte senutilaj diskutadoj oni decidis ke la esperantistoj estu organizitaj nacie kaj ke naciaj societoj interrilatu kaj finance subtenu la oficialajn instituciojn kune kun UEA.

Vere strange estas, ke la plej justa vojo, kiu ĉiam estas la plej facila, estu tamen la lasta, al kiu ni iras! Kaj ĉiutage en la plej diversaj nacioj oni organizas naciajn kongresojn de esperantistoj. Oni diskutas kaj diskutacas, en nacia lingvo, pri organizado, propagando ktp. kaj oni forgesas la ĉefan aferon, Esperanto.

Esperanto estas lingvo helpa internacia. Do ni devas ĝin studi kaj internacie apliki. Sufiĉas gramatikoj kaj kursoj por la studado kaj UEA aŭ internaciaj specialaj asocioj por la aplikado. Sed tiu ĉiu simpla kaj facila vojo, ŝajnas, ne estis tiel simple aĵebla. Tute same kiel la plej multaj el la homoj anstataŭ trarigradi dum kelkaj horoj esperantan gramatikon, preferas dum longaj horoj diskuti pri aĵaj teoriisistemoj aŭ pri nesolveb eco de la problemoj La esperantistoj, anstataŭ studi kaj apliki Esperanton, preferas elspezi monon kaj tempon por necie diskuti kaj diskutaci pri propagando, pri sukceso, pri aŭtoritatoj ktp. ktp. Interna ideo, samideano, frateco, ktp. estas la vortoj ofte ripetitaj kelkfoje precipe ĉe la lastaj kongresoj, oni parolis pri nacismo, defendo de la influo de eksterlandaj lingvoj ktp. Situatio kun multenombraj paraĝrafroj regas la naciajn societojn; ĉiutage oni aldonas paraĝrafrojn aŭ oni faras ŝanĝojn; oni aplaudas al granda raporto de la prezidanto, oni sendas telegramojn al la Reĝo, al la Prezidanto de ministroj, al diversaj aŭtoritatoj kaj eĉ al eminentaj esperantistoj, kiuj ne ĉeestis al la kongreso, elspezante tiamaniere tempon kaj monon sen fruktoj. Unuvorte oni laboras tute same kiel por la movado de iu speciala partio aŭ sektoro, kaj oni forgesas, ke Esperanto estas lingvo, kiu povas taŭgi por la plej malsamaj celoj internaciaj.

Do por ke Esperanto progresu pli rapide, sufiĉos eldoni grandan kvanton da libroj por la lernado, kiujn oni devas trovi ĉe ĉiuj librovendejoj, malfermi pli da kursoj kaj interkonatigi la esperantistojn.

Por la libroj sufiĉas, ke la esperantistoj ĉesu vendi ilin, apoguj la eldonistojn, kiuj kuraje ilin eldonas, kaj demandu ilin senĉese al siaj librovendejoj.

Por interkonatigi kaj interrilatigi la esperantistojn sufiĉas, ke oni organizu kursojn en publikaj lernejoj je fiksitaj tagoj kaj horoj, ke oni publike diskonigu ilin tiamaniere, ke estu eble al ĉiuj eksterlandaj aŭ enlandaj esperantistoj, trapasante la

urbon, ilin viziti. Do krei difinitajn centrojn de instruado kaj diskonigi ilin, estas la plej taŭga maniero por lerni la lingvon. Pagigu al la lernantoj kotizon por la kurso kaj parton el tiu ĉi kofizo uzu, por ke je la fino de la kurso la lernanto ricevu kelkajn numerojn de esperanta gazeto, kaj instigu ilin fariĝi membro de UEA. Anstataŭ al nacia organizado portu tuj la novan esperantiston al internacia organizado. Do, lernado kaj aplikado, ne babilado kaj diskutado! La ĉefa eraro estis la nacia organizado. Per Esperanto ni estas internacianoj; do ni organizu nin internacie.

Lernolibro de Esperanto, kiu ne kondukas al internacia aplikado de Esperanto, kurso de Esperanto, kiu ne kondukas al internacia organizado, estas vanaj laboroj kaj fortoj perditaj!

D-o A. Stromboli, Pisa, Italujo.

Favara letero de Germana Ministerio de Interno por instruistoj, irontaj al Wien.

Ĉar la Deksesa en Wien okazos proksimume unu semajnon pli malfrue ol la antaŭjaraj kongresoj, la partopreno de instruistoj el tiuj federal-ŝtatoj estos duba, en kiuj la granda libertempo jam finiĝos komence de aŭgusto.

Sekve al laŭcela petico de la Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko la Ministerio de Internaj Aferoj en Berlin turnis sin letere al la instru-administracioj de la unuopaj federal-ŝtatoj, rekomendante plej eble larĝvidan forpermesigon de instruistoj, kiuj partoprenos la kongreson.

Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko D-o Dietterle.

Enkonduko de Esperanto en Lernejoj.

Germanujo.

Königstein. La urbo oficiale enkondukis Esperanton en la popolernejoj kiel laŭvolan fakon; instruas s-ino Pii chel kaj s-o Erlbeck. 2 klasoj kun 57 infanoj.

Lohmen Privata instruoj en la popolernejoj; 5 klasoj kun 55 infanoj; instruas s-oj Nitsche, Reichel, Schubert (lernejestro).

Pirna. La urbo oficiale enkondukis Esperanton en la popolernejoj kiel laŭvolan fakon; 4 klasoj kun 115 geknaboj. Instruas s-oj Grossmann, Henning, Ludwig, Schimpf. Ankaŭ en la profesia lernejo oficiala Esperanto-klaso estas aranĝata; instruisto Schmidt. En la komercernejo gvidas privatnan kurson s-o Göckner kun 18 p.

Dua radio-parolado en Hamburg.

Nur post fino de la redaktado de lasta numero ni ricevis informon, ke lundon la 23 junio posttagmeze je la 5 horoj s-o Karl Minor-Hamburg faros radioparoladon de la stacio de Hamburg (ondolongo 392) pri „La XII. Germana Esperanto-Kongreso kiel spegulo de l' hodiaŭa stato de la Esperanto-movado“. Aŭdintoj de la parolado estas petataj tuj informi pri la rezultato la paroladinton laŭ adreso: Hallerstr. 6, Hamburg.

Radio.

Internacia Radio Asocio.

Esperanto akceptita de radiokluba federacio.

New-York. La 9 majo en speciala kunveno membroj de „Harmonio Klub“ organizis new-yorkan filion de I.R.A., 26 anigis al Internacia Radio Asocio. Grava fakto por I.R.A. kaj Esperanto estas ke s-o E. J. y Quimby, prezidanto de Radio Asocio de New-York'a Distrikto, entuziasme konsentis akcepti elekton kiel Amerika Sekretario de I.R.A. Federacio de radio-klubo, de kiuj li estas prezidanto, ĵus akceptis Esperanton kiel mondan radio-lingvon. Ĉiu radio-amatoro aŭ esperantisto en Ameriko, kiu interesiĝas pri I.R.A., estas petata anigi per sendo de 25 centoj (\$ 0,25) al s-o E. Jay Quimby, Radio Association of Greater New York, 587 West 181st Street, New-York City. Pli ol la membro-kotizo estas urĝe petata, por ke pli efika propagando en la nun t.e. grava radio-kampo de Ameriko estu farebla.

James Denson Sayers, New-York.

Gramofondiskoj por Esperanto.

Rilate al mia artikolo de 14 oktobro 1923 ŝajnas, laŭ la du interesaj respondoj ricevita, ke ne ekzistas esperantaj gramofondiskoj, sed nur cilindroj.

La fonografo bezonanta cilindrojn, almenaŭ en mia lando, jam antaŭ longe estas forpuŝita de

la gramofono bezonanta diskojn. Ŝajnas, do, ke, se Esperanto deziras meriti la nomon „vere vivanta lingvo“, ĝi ankoraŭ bezonas siajn proprajn gramofondiskojn same kiel praktike ĉiu alia lingvo.

La voĉo de la majstro estas por ni preskaŭ senpreza, kaj, se ni povas konservi ĝin, mi opinias, ke certe estas nia devo fari tion iamaniere fabela. Eble oni povas transkopii la cilindron entenananta la voĉon de D-o Zamenhof, kiun posedas s-o Sabadell de Barcelona, al disko, se li permesus. La senfadena „ampleksiga klapo“ jam uzata rilate al la gramofono povus helpi solvi la teknikajn malfacilaĵojn.

Sed, eĉ se ni ne povas fari tion, ne ekzistas kialo ke ni ne pretigu diskojn entenantajn la voĉon de vivantaj eminentuloj, aŭ diskojn, per kiuj oni povas instrui la lingvon nian. Certe la fiksado de modela normo de elparolado por internacia uzado estas grava celo kaj meritas la atenton de la esperantista mondo. Kiu agos?

W. R. Wood, Torquay.

Esperanto kaj Turismo.

Propono akceptita en la ĝenerala kunveno de la Klubo de ĉeĥoslovakaj turistoj okazinta en Brno la 6-a de junio 1924 en ĉeesto de la delegitoj el la tuta respubliko.

Por ke oni helpu la turismon kaj alfluo de fremduloj en nian landon, por ke oni plilarĝigu la horizonton de nia junularo per rilato kun fremdaj junuloj estas necese fondi internaciajn noktejojn por la junularo en Ĉeĥoslovakujo, kiuj post interkonsento kun fremdaj ŝtatoj fariĝus membroj de la organizo de internaciaj noktaj loĝejoj similaj en ĉiuj ŝtatoj.

La noktejoj de Klubo de ĉeĥoslovakaj turistoj jam elproviitaj ĉe ni eble tuj povus esti malfermitaj al fremda junularo je kondiĉoj preskaŭ egalaj kiel al niaj studentoj. Mi proponas, ke oni komencu jam ĉi-jare. Ni donu tiun belan ekzemplon! Por ke la fremdaj junaj turistoj estu kontrolitaj, oni provizore prove allastu nur la ĝejunularon konstantan Esperanton. Ili uzas jam la servojn de UEA, kiu en 1915 havis ĉe ni delegitojn en 102 urboj. La delegitoj eble helpus al junaj gastoj per konsiloj.

Eventualaj specialaj elspezoj estus pagataj el kofitoj kaj el mona subteno ŝtata.

Almenaŭ en intereso de nia junularo ni faru breĉon en remparoj, kiujn inter nacioj konstruis la milito.

Samideanoj helpu kaj raportu pri via laboro al redakcio de „Esperantista Junularo“ aŭ al Rudolf Fridrich, profesoro, Kralovo Pole, Ĉeĥoslovakujo.

Nordalbinga Esp. Ligo.

Raporto pri la ligoĝato en Wismar (Meckl.), 28–29 majo 1924.

La estraro de la Nordalbinga Ligo gratulas s-on Karl Peters, Wismar, pro la lerte aranĝita ligoĝato kaj dankas al li kaj liaj kunlaborantoj pro ilia penado.

Jam dum la vespero de 28 majo okazis publika kunveno en la granda salono de Fründ's Hotel. Grandare venis esperantistoj kaj ne-esperantistoj. Post saluparolado de D-o s-o Karl Peters parolis s-o studo-direktoro D-o A. Möbus, Lübeck, pri „Esperanto kaj popolklerigo“ (germanlingve). Tiun spiritplenan paroladon sekvis instru-provo kun 12 knaboj de 9–11 jaroj. La knaboj, kiuj antaŭe ne estis instruitaj pri Esperanto, vige kaj trafe respondis la demandojn de la instruisto D-o Schuppel, Parchim. Kiel tria punkto sekvis parolado de la eksportisto s-o A. B. C. Senff, Hamburg, pri „Esperanto en komercio kaj trafiko“ (ankaŭ germanlingve).

Trê favore imponis al la publiko la de s-o H. Böbs, Lübeck, aranĝita vasta ekspozicio de pli ol mil diversaj gazetoj, gvidlibroj, katalogoj, gramatikoj kaj libroj de la klasika literaturo.

Post la paroladoj oni kune restis ĝis malfrua horo; belaj prezentadoj ĉarmis la ĉeestantojn, i. a. la bela komedio „Pro Dio ne esperanton!“ de Karl Minor, kiu mem kunaktoris. —

La sekvantan tagon okazis post lerte gvidata promeno tra la urbo kaj ĝiaj belaj antikvaĵoj la laborkunsido, festamango kaj posttagmeze ekskurso al la marbaneja vilaĝo Wendorf.

Oni povas esperi, ke la Esperanto-movado en Wismar trovos fruktodonan kampon.

(A. B. C. Senff)

Helpu niajn infanojn!

Malsato, malsanoj, morto, nemezurebla mizerigo minacas jam de longe niajn germanajn infanojn, precipe en la iam tiel bela Rejnregiono. Pripensu, karaj gesamideanoj, i n f a n o j malsatas, infanoj korpe kaj spirite mizeriĝas kaj pereas, infanoj senkulpaĵ pro la malfeliĉo, infanoj al kiuj mankas eĉ la kompreno pri la katastrofo, kiu trafis nian landon, infanoj, kies demando „Pro kio?“ sangigas nian koron.

En n-o 185 de ĉi tiu gazeto ni laŭtigitis helprikon por subieno en kiu ajn formo. Nome de la esperantistaj gepoŝtistoj en Köln ni alvokis vian bonfarenon; ni priskribis al vi la mizerigon,

pro kiu suferas ne en lasta vico la infanoj de la oficistoj. Bonvolu relegi nian alvokon. Denove ni turnas nin al ĉiuj bonkoraj samideanoj, ke ili helpu nin forigi de niaj infanoj la plej maldolĉajn fraĵojn de l' malfeliĉo. Inter la esperantistaro la idealismo kaj la helpemo ja devas esti plej grandaj. Kun dankego ni akceptos viajn donacetojn, kiuj estos disdonataj inter la plej multe bezonantaj infanoj de rejnlandaj poŝt- kaj telegraf-oficistoj.

Sendis ĝis nun:

S-o Supera Registarkonsilisto Otto Reber, Bamberg 4 mk.
 P. v. Medem, Kaunas, Litovio (kolektitaj inter siaj konatoj esp. kaj neesperantistaj) 400
 Dr. Josef Hoffmann, Zilina 500 ĉ kr.
 Esperanto-Klubo Pötschmühle 55
 S-o Cesar Sala, poŝt oficisto, Mantova, Italujo (kolektitaj inter siaj gekolegoj) 153 lirojn

Kun korega danko ni kvitancas. Imiĵu la ekzemplon!

Oni bonvolu adresi al:

Conrad Creter, poŝtinspektoro
 Ober-Postdirektion
 Köln, Germ.

Por la esp. gepoŝtistoj en Köln
Conr. Creter, S. Altendorf, Thoma
 poŝtinspektoro. S. Sekr.

Kroniko.

Por servi nian legataron per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informaro, ni bezonas scigojn (sur poŝtkarto aŭ aparta folieto unufante skribita, sed ne inter administrat' aŭ privataj scigoj) pri ĉiu novaĵo el la esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidele, legeble (precipe nomoj).

Ameriko.

Mezameriko.

Gvatemalo A. V.

Tucuru. S-o José Poltsbach tie propagandas Esperanton. Oni sendu al li propagandilojn.

Salvadoro.

Ankaŭ tie revekiĝas la esperantistoj. En urbo San Salvador ni nun retrovis esperantiston s-o inĝeniero José Mejía.

Sudameriko.

Ekvadoro.

Cuenca. Kiel frukto de propagando de vojaĝantaj esperantistoj eksterlandaj korespondadoj montras enradikiĝon de Esperanto en ĉi tiu ŝtato. En Cuenca troviĝas s-o Rosendo Contreras, vigla korespondanto.

Aŭstralio.

Novzelando.

En Novzelando nia lingvo bone progresas. Dank' al nia entuziasma pioniro s-o W. L. Edmanson (Wellington), kioj starigis en la karceroj. La eksperimento bone sukcesis, kaj kelkaj maliberuloj havigis al si la Diplomon de la Brita Esperanta Asocio. la novzelanda ĉefjuĝisto kavaliro Roberto Siout estas fervora esperantisto.
C. E. Mackay, Wellington.

Azio.

Koŝin-Ĥinujo.

Saigon. La poŝto anoncis al ni, ke tie mortis antaŭ kelka tempo tre malnova samideano s-o Carrère, inspektoro de lernejo. Ni bedaŭras, ke per lia morio nia movado en ekstrema Azio perdas aktivan pioniron.

Kiu povas doni al nia redakcio adresojn de samideanoj en ekstrema Oriento?

Ĉeĥoslovakio.

Jičin. Esp. Rondeto „Comenius“ aranĝis kurson de Esperanto sub gvidado de s-o Siki, del. UEA, partoprenis 25 personoj. Samtempe estis sub gvidado de s-o Mikolas aranĝita kurso por soldatoj, kiuj partoprenis pli ol 30 soldatoj. En ambaŭ kursoj estis granda sukceso.

Trautenau. La Esperanto Grupo okazis la 5 kaj 4 majo en Trautenau la 17-an laborkunveno de la orient-bohemaj esperantistoj. Ĉeestis preskaŭ 100 personoj el 25 lokoj. La 5-a vespre estis amuza vespero kun tre bona sukceso. S-o Prof. Scholze (Reichenberg) parolis germanlingve pri „Radio kaj la mondlingva problem“. Sekvis reĉitadoj. La 4 esitis la kunsido, kiu precipe prilaktis organizajn, regionajn aferojn.
Kz.

Banurbo Teplic-Ťchönnau. La urba kuraceja direkto konstatas neatenditajn sukcesojn okaze de la ĉefartikolo en ET n-o 189.

La esp. prospektoj estas forsenditaj. Nericevintoj bonvolu ilin repostuli.

Franĉujo.

La 1-a junio okazis en Arcueil la Kongreso de Federacio de la Parisa Regiono, kiu partoprenis pli ol 200 kongresanoj. La kongreson mallermis urbestro. La bankedon prezidita Prof. Richet, membro de la Sciencia Akademio. Paroladon en Esp. faris s-o Cotton, Prof. en la Parisa Universitato kaj nova membro de la Sciencia Akademio. Saluti la Kongreson hungaro, ĉeĥo, bulgaro kaj ruso.
L. Agourttine

Germanujo.

Altona (Elbo). Komencis Esp.-kurso. Partoprenas 7 junuloj. Gvidas s-o Kurt Levy.

Esperanto Grupo Berlino. En la maja monata kunveno la 20 de majo parolis s-o D-o Ellerbeck „Pri la vortifrado per gramatikaj finaĵoj“, diskutado pri la temo sekvas en la junia kunveno, la 17. 6. S-o Prof. Dieterle kaj s-o Ellerbeck raportis pri la konferenco en Genève. La 19. 5. okaze de la cindriga soleno de Emanuel Reicher, honora membro de la berlina grupo, s-o Dir. Glück faris nekrologon en germana kaj esperanta lingvoj. La 17 majo grupo Espero Friedenau aranĝis printempan feston kun komuna vesper-mango en Ratskeller Friedenau, bone vizitita.
H. N.

Dresden. S-o D-o fil. Kreissig instruas 8 ĝejunulojn.
P. G.

Dresden (GEA, loka unuigo). Monata kunveno 28. 5. Parolado kun bildoj de s-o instruisto Meves pri „la uzado de bildoj en Esp.-instruo“. Internaj scigoj pri kontentigaj progresoj kaj sukcesoj de nia movado. Monataj kunvenoj de la loka unuigo ĉiam la lastan merkredon de l' monato.

Elsterwerda. Instruisto A. Welmer aranĝis la unuan kurson en nia urbo. Ĝi komencis la 2-a junio kun 10 partoprenantoj.

Freiberg (Sachsen). La loka grupo komencis novan kurson kun 45 p. sub la gvidado de s-o Späner.

Landshut. S-o Gaessler eligis el GEA. Kiel prezidanto kaj sekr. funkcias s-ano Hubauer, kiel kas. s-ano Roth. La grupo havas nun 21 membrojn, la kurson partoprenas 16 komencantoj. Gvidas s-ano Hubauer. La kurso okazas ĉiutage je la 8 h. en la restoracio „Ludwigshöhe“ Münchnerstrato 15.

Landstuhl. (Bavara Palatinato), 29 majo. Kunvenis la grupoj de Kaiserslautern, Kreuznach, kaj Wiesbaden kun multe de saarländaj esperantistoj el Kindsbach, por ekskursi kun multnombro aperintaj gesamideanoj kaj por interkonatiĝi.

Oni decidis pli ofte kunveni dum tiu ĉi somero. Oni tre dankas al s-o Kolon el Saarbrücken por la belegaj ŝerckantoj, per kiuj li tre amuzigas la gesamideanojn.

Pirna. Laborista grupo fondiĝis, nova kurso komenciĝis sub s-o Ludwig.
P. G.

Elberfeld La en la Reinlando-Vesifalia Ligo (Revelo) unuigitaj grupoj kunvenis dimanĉon la 25 majo en Elberfeld.

Oni konfesis, ke la Revelo denove reatingis sian antaŭan fortecon, preparolis gravajn decidojn por la Dekdua Germana Kongreso en Plauen kaj elektis la prez. de Revelo s-on Junker-Köln kiel delegiton.

Oni decidis, aranĝi por la Revelo kursojn por kursgvidantoj kaj plue, ke ne plu la printempa, sed la aŭtuna kunsido estu la ĉefa.
Gäßler, sekr.

Saar-Teritorio.

Wiebelskirchen (Saar). 25 majo okazis kunveno por komenci novan kurson kaj fondi grupon esperantistan. La kurso komencos en junio sub gvidado de fervora samideano s-o Gerlach el Neunkirchen.

Al la grupo tuj aliĝis 20 personoj. Kiel prez. oni elektis s-on Diesel, kiel sekretarion s-on Mesch, kiel kas. s-on Müller. Oni ankaŭ decidis, ke la grupo aliĝu al la Esperanto-Ligo Saarteritoria. Ni deziras al la nova grupo bonan sukceson.
Nik. Donien.

Hispanujo.

Katalunujo.

Barcelona. La 18 majo okazis en la arbaro de Can Vinyals apud Sabadell la ĉiujara festo Aplec de Esperanto organizita de la grupoj Aplec el Sabadell kaj Suno el Terrassa.

Paroladis s-o Carsi esprimente per tre poezia nuancoj la animon de la Naturo kaj legis kelkajn fragmentojn de poezia verko de la kataluna poeto Victor Valguer. Post-tagmeze multnombra ĉeestantaro ekskursis en la arbaron.

Oni havis la ĝojon saluti tie eminentajn esperantistojn kaj kelkajn fremdulojn.
 Oni reprezentis sub libera ĉielo la spritan teatraĵon en kataluna kaj esperanta lingvo Els Corridos.

Poste paroladis niaj batalemaĵ pioniroj s-oj Delf Dalmau, Marian Solà kaj Jaume Grau Casas multe aplauditaj.
A. Durà, Barcelona.

Italujo.

Milano. La 7 junio okazis ĉe „Esperanto Domo“ en Milano, Via Spiga 29, prelego pri Kani de samideano P. Giolla. — bona publiko kaj sukceso.

Udine. — En la vasta teatro de la „Ricreatorio Festivo Udinese“ (afable disponita) la 18 majo, Prof. Francisco Pizzi el Venezia parolis pri: Esperanto kaj katolika movado.

Jugoslavio.

Grohote. Instruisto s-o Mladinov sukcesplene gvidas kurson en la popola lernejo.

Imotski. Imitinda ekzemplo de s-o Markota, gvidanto de la esp. kurso; ĉiu lernanto pagas po 10 din. por la kazo de la Il-a Sudslava Kongreso.

Janjina. Neniam laciĝante laboras s-oj Baselli kaj Marinovic. En la tre legata ĵurnalo „Ĵurnali List“ je pasko aperis bonega propaganda artikolo verkita de s-o Marinovic kaj artikolo „Esperanto kaj radiotelefono“ de D-o Maruzzi.

Makarska. Okazis propaganda parolado je Pente-kosto. Samtempe okazis regiona kunveno de samideanoj el Dalmacio.

Omis. La movado revigliĝas. Nova kurso gvidata de s-o Katalinic bone vizitita.

Podgora. S-o Sumić gvidas novan kurson por knaboj. Valoraj kunhelpantoj estas la fratoj Marinovic.

Podgora. Novan kurson de s-o Sumić vizitas 20 knaboj.

Puiniković. Nia movado penetras en la plej malproksimajn vilaĝetojn dank' al la fervoro de nova samideano instruisto M. Nožica.

Sarajevo. En Sarajevo ekfunkcias denove bone konata antaŭmilita societo de bosniaj kaj hercegovina esperantistaro „La Stelo Bosnia“. La 18 majo okazis ĉefa kunveno ĉe kiu partoprenis 20 personoj. Estas elektita sekvanta komitato: Safet Bakarevic prezidanto, Fridrich Mešić viceprez., Ferhad Kapetanov, sekretario, Elišau Romano komitatano. Anasias Dobravac bibliotekisto, Kontrola komitato: Dzemal Ĥezirovic prezidanto, G. Franciski viceprez., Margazita Burko komitatano. Eksterlandaj societoj, estas petataj por absendo de diversaj esperantejoj. Adreso: Societo de bos-herc. esperantistaro „La Stelo Bosnia“ Sarajevo (Hotelo Sarajevo).

Split. Vigle laboras la Kongresa Komitato. Ankaŭ eksterlandanoj montras intereson por la kongreso. Ne preterlasis la belan okazon viziti la sunan marbordon de Dalmacio!

Polujo.

Lublin. La 27-aprolo okazis ĉie malfermo de publika „Esperanto Informejo“ apud ĉefurbo Krak. Pradmiencie 44, gazet-vendejo de s-o Poniatowski. Ĉi-s-aĵo trapasanta la urbon, eniru ĉien por ekscii necesajn informojn.
 Poznań. La informojn kaj Esp.-ekspozicion dum la Poznanja foiro de 18. 4. ĝis 5. 24 vizitis krom multaj polaj s-anoj ankaŭ kelkaj el Germanujo, Franĉujo, Danujo, Rumanujo kaj unu el Nederlando. Oni disvendis pli grandan kvanton da lernolibroj, propagandiloj ktp.

Lublin. Dimanĉo la 18 majo kunvenis Lublina Laborista Esperantistaro en nia renovigita sidejo je Bernardynska 2. K-do Zavada parolis pri malfermo de kursoj. Poste oni elektis novan estraron. Je fino de l' kunveno oni legis kaj tradukis. Ĉiujn korespondojn oni devas adresi al: Laborista Esperantistaro Rondo, Lublin, Bernardynska 2. Polujo.

Portugalujo.

Lisbõa. — Ĉe la Instituto Komercia de Lisbõa okazis propaganda parolado pri Esperanto. Prezidis lerneestro, kiu simpatias kun la ideo, kaj parolis la fervoraj samideanoj Xavier Valente kaj Saldanha Carreira, delegito de UEA. Malgranda ekspozicio estis aranĝita. Ĉeestis 60 lernantoj. Kurso komenciĝos. La movado ĉe ni ekvigliĝas dank' al la klopodoj de kelkaj samideanoj.

Bedarinde malhelpas nian agadon la manko de lernolibroj, kiel ekzemple — vortaroj.

Rumanujo.

Bukureŝti. La 18 majo okazis prop. kunveno... kiel rezulto estas 3 kursoj en la ŝtataj liceoj...

Rusujo.

Rostov sur Dono. La 18 majo k. j. okazis general-kunveno de la UEA... Esperantista Organizaĵo...

Siberio.

En malproksima anguleto de la malvarma Siberio, laŭ iniciato de la kamaradoj Tomilov kaj Pesino estis organizita la grupo de volontuloj por lernado de Esperanto...

Ĝenerala. La 30 aprilo Irkutskaja Gubernia Fako de S. E. U. aranĝis koncerton kun deklamo, kantado kaj pianado. Aniaŭ la koncerto prezidanto de Fako faris raporton pri la 7 jara laboro de tiu organizaĵo.

Ĝenerala. La 30 aprilo Irkutskaja Gubernia Fako de S. E. U. aranĝis koncerton kun deklamo, kantado kaj pianado. Aniaŭ la koncerto prezidanto de Fako faris raporton pri la 7 jara laboro de tiu organizaĵo.

Leningrad. Esperanto-kursoj funkcias ĉe fabriklernejoj de fabriko "Elektrik" kaj lignoprilaborejo "St. Ĥalturin". Malgranda kurso estas gvidata ĉe Societo Esperantista "Espero".

7/V okazis parolado de Podkaminer pri Esp. en Domo de Proletaria Kulturo (aniaŭ 150 pers.) en kiu nun estas fondita Esp. Sekcio.

12/V Esp. Sekcio ĉe Klubo de Oktobra (Leningrad-Moskvo) fervoje aranĝis lecionojn de konata k-dino Anatolij "Kulturo kaj internacia lingvo" (160 pers.)...

Svislando.

Locarno. Okaze de la Floraj Ludoj la tieaj esperantistoj aranĝis impresan propagandon per ornamita Esperanto-ĉaro.

Ĝenerala. La 24 de aŭgusto la du grupoj aranĝos specialan programon por irapanataĵa kongresano (ŝipveturado al Rapperswil, ekskurso al Uetliberg, gvidado tra la urbo ktp.). Detaloj sekvas.

Bibliografio.

Eisenbahn-Wörterbuch Deutsch-Esperanto, im Auftrage des Verbandes Deutscher Eisenbahn-Esperantisten bearbeitet von G. Habellok, 1. Auflage, Breslau, Schleiermachersstr. 19, Selbstverlag, 18x21,5 cm, 50 pg., autografita.

multe plibonigi kaj perfektigi la faklingvon. Diversaj esprimoj estas tre trafe formitaj, sed vico da aliaj nepre devas esti kontrolitaj per helpo de eksterlandaj samprofesiaj...

Car ne estas eble ĉiuj ĉiuj laŭ mi korektindajn vortojn, mi mencias almenaŭ kelkajn por ilia graveco. Achslager = aksokuŝejo (aksoloĝro = aksokuseno).

Achslager = aksokuŝejo (aksoloĝro = aksokuseno). Sub "Lager" oni trovas la korektan "Lager". Ĉi tiu duko? Ausleger (am Kran) = malplenigo (??), Bahnhüberunterführung = fervojo sur (sub)konduko (??).

Libera tribuno.

Sub tiu ĉi rubriko laŭ disponebla loko estas lojale enpresataj ĉiuj scizoj, informoj, kritikoj, liberaj vortoj ktp. La redakcio tamen ne prenas sur sin ĉiun respondon pri enhavo, sed ĝi rezervas al si la rajton eventuale rifuzi neutilajn artikolojn.

La anoj de la grupo Wien de Esperantista laboristaro kristana de Aŭstrio diskutis dum sia lasta interparolado vesperoj pri la esprimo "Esperantisto". Ili opinias, ke la sufikso "-ist" signifas personon sin okupantan profesie per tiu okupado, kiu estas esprimita en la vortradiko.

Gazetaro.

Pro troa materialo ni ne havis lokon ĝis nun por menci la ricevitajn gazetojn kun artikoloj pri Esperanto. Strassburger Neueste Nachrichten, 5. 4. Radioparolado New-York. A. Noite, Rio de Janeiro, pri UEA (tre detala).

Al niaj legantoj!

Ni rekomendas al niaj legantoj la specialan noton aldonitan al tiu ĉi numero. Al parto de la eldono estas aldonita aliĝilo por la IX. Itala Kongreso.

La plej malmultekosta libro en Esperanto Ĉiu devas nepre posedi la libron Eŭropo ĉe la abismo de Francesco Nitti iama ministrara prezidanto itala Esperanto-traduko kun speciala antaŭparolo de la eminenta aŭtoro. (Preskaŭ 200 paĝoj.) Jus aperis. Prezo 4 sv. fk. Mendu tuj!

Anoncetoj.

Anonctoj pri esperantista vivo (naskiĝo, fianĉiĝo, edziĝo, morto, okazontaj gravaj esp. kunvenoj, festoj k. s.) se n. p. a. g. Aliaj anonctoj, nur akceptitaj por minimume du sinsekvaj enpresoj, kostas po du enpresoj (kaj 20 vortoj (krom unu adreso) la prezon de ok BT-numero) kontraŭ antaŭa pago. Abonantoj ĉe kiuj ni povas depreni la pagon de la abonontoj, ĝus por (propra anonctoj preferon prezon de kvin BT-numeroj: Germano) pagas 2.— unu, prefera prezo por postabonantoj 1.25 mk. Anonctoj devas alveni 12 tagojn antaŭ publikigo.